

N. G. HOEN



emile
peltier

KRISTANA KULTURO
IKUE-KAJERO N.ro 1

EMILE PELTIER

APOSTOLO DE KATOLIKA ESPERANTISMO

Biografio verkita de
N. G. HOEN

KRISTANA KULTURO ☆ IKUE-KAJERO

1

Eldono de

INTERNAĈIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Al la francaj katolikaj esperantistoj,
en kies lando ekfloris la internacia
katolika Esperanto-movado.

ENKONDUKO

Estis la 20-a de septembro 1870, kiam Emile Peltier naskiĝis en la vilaĝeto Villendrayt apud Tours, en la distrikto Indre kaj Loire, Francujo. Pri la unuaj jaroj de lia junaĝo neniam rimarkindaj faktoj estas konataj.

Jeanne LE BOEDEC konstatis en la „Franca Katolika Esperantisto” de aprilo 1959: „Ek de sia plej juna aĝo li montris kortuŝantan pie-mon. Je aĝo de 7 jaroj li jam iris ĉiutage al la Sankta Meso. Libera elekti sian vivvojon, li eniris en 1884, je aĝo de 14 jaroj, la seminario de Tours”

En la sekvantaj jaroj, kiam Peltier sin preparis por la sacerdotiĝo, la intereso de la studento sin direktis precipe al la studado de lingvoj, kaj li akiris profundan konon, speciale de la angla kaj germana lingvoj, kaj sufiĉan konon de la itala, hispana kaj portugala lingvoj.

La 27-an de majo 1893 la sacerdotiĝo finis la unuan vivperiodon de Emile Peltier.

Pro siaj lingvaj konoj li estis nomita profesoro de la Malgranda Seminario kaj de la kolegio S. Gregorio en Tours.

Kiel profesoro li poste publikigis, laŭ Hugette Royer en „Espero Katolika” de oktobro 1953, diversajn literaturajn verkojn, i.a. francan tradukon de verko de Ruskin „Unto this last”.

Kiel lingvisto sacerdote Peltier interesiĝis pri la internacia lingvo Esperanto, verŝajne dank’ al la propaganda agado de alia franca katoliko, eminenta esperantisto: Louis de Beaufront, kaj eklernis la Zamenhofan lingvon en 1901. En Polujo kaj Rusujo intertempe Esperanto jam trovis diversajn fervorajn disĉiplojn, inter ili en Rusujo m-ron Dombrovski kaj la episkopon Zerr de Saratov.

„VEKIĜU, ESPERANTISTOJ!...”

Pristudante la vivhistorion de sacerdoto Emile Peltier kiel granda katolika Esperanto-pioniro el la unua parto de la dudeka jarcento, oni penetras profunde en la unuan periodon de „Espero Katolika” kaj de la internacia, katolika Esperanto-movado; ĉar ambaŭ formas kvazaŭ unu tuton, kies ĉeffadenoj interplektiĝas tiel intime, ke ili historie estas nedivideblaj.

La nomo „Espero Katolika” unuafoje faris sian eniron en la historion de la internacia, katolika Esperanto movado en decembro 1902, ne kiel nomo de revuo, sed kiel nomo de regula kaj formala societo, kompleta kun presita regularo kaj eĉ eklezie rekonita.

Ke traktis pri unuiĝo — kaj ne pri organo — evidentiĝas klare el skizo de sacerdoto Emile Peltier en no. 20 de aŭgusto 1905 de la revuo „Espero Katolika” en kiu li, la fondinto, raportis: „Jun tagon, en la monato aŭgusto de l’ jaro 1902-a, mi ricevis leteron de nekona-ta esperantisto, kiu proponis al mi la fondon de speciala societo por la disvastigo de la lingvo Esperanto inter la katolikoj.

Nur kelkaj monatoj mi estis Esperantisto, kaj ankoraŭ tre mallerta. Mi tamen ne ŝanceliĝis akcepti la proponon de Henri Auroux, tial ke ĝi respondis je miaj plej karaj deziroj.” Tiel do estis fondita la societo „Espero Katolika”. La ĉefepiskopo de Tours — Rene François — eĉ sankciis la 6-an de decembro 1902 ĉi tiun unuan formon de organiza-do internacia de katolikaj esperantistoj per jena aprobo:

„Vi postulis mian juĝon pri entrepreno, kiu celas unuigi la ĉiunaciajn katolikojn per la internacia helpa lingvo, nomata Esperanto. Mi tre volonte aprobas tiun projekton, kiu al mi ŝajnas favori la disvastiga-don de l’ Evangelio kaj la pliunuiĝon de l’ popoloj.”

Ĉirkaŭ okdek Esperantistoj katolikaj respondis al la alvoko de sacer-doto Peltier por aliĝi al la nova societo. La franca ĵurnalo „l’Aube” (La Tagiĝo) en januaro 1903 akceptis funkcii kiel organo de la

novnaskito, enpresante kvar paĝojn katoliko Louis de Beaufront¹⁾ disponigis la kolonojn de sia monata revuo „l' Esperantiste” al la katolikaj esperantistoj.

Sed baldaŭ montriĝis, ke la nombro de katolikaj esperantistoj, kiuj sin anoncis, bedaŭrinde ne donis sufiĉe sanan ekonomian bazon, por ke la nova societo povu ekfunkcii enfakte; — kaj la fervoraj klopodoj de sacerdoto Peltier por pligrandigi la nombron de membroj ne havis la necesan sukceson. Tio kaŭzis ankaŭ malfacilaĵojn koncerne la juran aprobon, postulitan laŭ la francaj leĝoj, pri kio la iniciatinto s-ro Henri Auroux deklaris en la unua numero de la revuo „Espero Katolika” — oktobro 1903 — jene:

„Multaj konsentis iĝi anoj de tiu societo, sed neniu volis iĝi membro de l' administrantaro; ni proponis, ke Direktoro, elektita de la ĉefaj anoj, administros la societeton sub sia respondeco persona, ni ne povis varbi la minimuman nombron da elektistoj; kaj kiam ni sendis al nia subprefekto nian regularon, li ne volis akcepti ĝin, ĉar leĝe la societo ankoraŭ ne estas formita.”

En tiuj cirkonstancoj io decida kaj radikala devis okazi, por ke ne ĉio estu perdita.

Sacerdoto Peltier kaj Henri Auroux organizis personan renkonton kaj la rezulto de ilia preparolado estis la decido, „forlasi dum kelke da tempo la societeton kaj fondi revuon, kiu celus ne propagandi Esperanton, sed ĝin utiligi.”

„Espero Katolika” nun do kiel societo ĉesis ekzisti, ĝi tamen kvazaŭ renaskiĝis en alia formo kiel monata revuo.

Ŝanĝo konsiderebla, devigita de la nefavoraj cirkonstancoj. La katolika esperantistaro montriĝis ankoraŭ ne organizmatura. La fondo de la internacia societo „Espero Katolika” evidentiĝis antaŭtempa, kaj la ŝanĝo de formo — pli bone de taktiko — necesiĝis pro la momenta situacio, kiu postulis tujan agadon, sen plua prokrasto.

1) Laŭ Edmond Privat, en la unua parto de sia „Historio de la lingvo Esperanto”, paĝo 59: „Sur la unua adresaro de la Esperantistoj eldonata de D-ro Zamenhof en 1888, troviĝas jam la nomo de Louis de Beaufront.” Li estis mem aŭtoro de internacilingva sistemo „Adjuvanto”, kiun li forlasis por fariĝi esperantisto. En 1898 li kaj René Lemaire fondis la revuon „l' Esperantiste”, kaj la „Societo por la propagando de Esperanto”.

Sacerdoto Peltier posedis la grandan moralan kuraĝon, efektiviĝi tiun sendankan taskon. Poste montriĝis, ke ankoraŭ plurfoje li devis doni pruvojn de eksterordinara, intensa kaj morala forto.

Pri la principo oni decidis: „Espero Katolika” transformiĝu de socio-
to al monata revuo; sed kiel, kiam kaj je kiu bazo realigi tion?

Ĉar grava estas la ek-punkto, la gvidlinioj laŭ kiuj nova revuo komen-
cas sian ekziston. Kia fariĝos ĝia karaktero inter la aliaj jam ekzistan-
taj Esperanto-revuoj?²⁾ Ni jam vidis, ke la revuo „celus ne propagan-
di Esperanton, sed ĝin utiligi.”

Tamen, kiel kaj por kiu celo?

Poste tiun celon sacerdoto Peltier priskribis sekve:

„Espero Katolika” intencis esti ne lingva, sed literatura revuo kaj
internacia ligilo inter la katolikoj.”

Kaj pri la divido de la necesaj taskoj:

„S-ro Auroux devis esti la redaktoro, kaj mi la direktoro, zorgante
precipe pri la propagando.”

La idea kaj principa bazo estis fiksita, la praktika laboro povis ko-
menci.

Kaj tiu praktiko tuj prezentiĝis per diversaj malfacilaĵoj: la presisto
nur pene trovis literojn sursignitajn, multaj preparoladoj necesigis
ŝanĝon de diversaj punktoj kaj prokraston; kaj ne antaŭ oktobro 1903
la unua numero de „Espero Katolika” aperis!

2) Kiel Edmond Privat komunikas en la dua parto de sia „Historio de la lin-
gvo Esperanto” ekzistis en 1900 la esperanta literaturo nur el 150 libretoj
kaj du revuoj: L'Esperantiste (dulingva: Esperanto kaj franclingva), kaj
„Lingvo Internacia”.

Tamen en 1902 la aktiveco de la naciaj ligoj fondigis diversajn revuojn,
nome: en Bulgarujo „Rondiranto”, redaktata de s-ro Oreŝkov; „La Lu-
mo”, en Kanado, dank' al propagando de Sac. Solis kaj s-roj Beauchemin
kaj Saint-Martin; en Belgujo „Sonorilo”, kun kiel iniciatintoj kapitano
Lemaire kaj s-ro Jamin; „Holanda Pioniro”, fondita de s-ro Bulhuis el
Hilversum, en Nederlando; „Suno Hispana”, de s-ro Codorniu en Valen-
cio, en Hispanujo; „Antaŭen Esperantistoj!”, do profesoro Villareal, en
Peruo; en Moravio s-ro Ĉejka eldonis: „Revuo Internacia”; ktp.

Edmond Privat konstatas: „Tiel, en mallonga spaco de du jaroj, la mova-
do fariĝis preskaŭ tutmonda.....”

En enkonduka artikolo, sub la titolo „Vekiĝu, esperantistoj”, Henriko Auroux, kiel unua redaktoro klarigis siajn intencojn: „Ĉiu aboninto, ki'ajn³⁾ estas lia religio, lia politiko, povos verki artikolojn pri ki'ajn⁴⁾ objekto, literature, filozofie, historie, k.t.p.”, elmeti kian ajn opinion; nur du kondiĉoj postulataj estos: klara stilo, „ĝentileco.”

El ĉi tiuj vortoj montriĝis, ke la redakcio de „Espero Katolika” ne deziris rezervi la kolonojn de sia revuo nur por katolikaj esperantistoj, sed metis ilin je dispono ankaŭ al alireligiaj samideanoj; se nur la ensendotaj artikoloj plenumus la kondiĉojn de „klara stilo” kaj „ĝentileco”.

Oni prave mirus pri tia preskaŭ senegala gastamo, se oni ne konscius pri la tiamaj tre intimaj rilatoj inter la tutmonda esperantistaro, kiaj ajn estis religio aŭ vivprincipoj; tiuj rilatoj praktike staris komplete sub influo de la konata Zamenhofa „interna ideo” kaj do apude alproksimiĝis al preskaŭ ekstremaj ideoj pri interfratiĝa kaj humanisma toleremo internacia.

Tiun toleremon la redaktoro intencis praktiki ankaŭ je lingva tereno: „Al ni do venu ili, kiuj, ĝis nune timemaj, ne kuraĝis esprimi siajn ideojn; ili ne turmentiĝu pri la gramatiko, pri la korekteco de siaj frazoj; ili nur penadu, laŭvere vivi, laŭvive pensi, laŭpense, klare, kompreneble verki”. Pliprecizigante: — „..... kiel eble ni korektos la mankojn de l' stilo, sed ne volas esti profesoroj pri gramatiko.”

La faktoj baldaŭ montris, ke ĉi-lastaj principoj tamen kaŝis en si la ĝermojn de troa lingva nekorekteco, kaj certgrade eĉ rektan danĝeron por lingva dialektiĝo, kaŭze de eble senlima lingva toleremo, iumomente ne plu korektebla. Preskaŭ tuj protestoj de ĉiu flanko envenis, kaj sacerdoto Peltier poste deklaris pri la afero:

Mi tamen estis ankoraŭ juna, seneksperimenta esperantisto. Mi bedaŭrinde allasis kelkajn ŝanĝetojn pri la lingvo, kaj nia unua numero, je sia eniro en la mondon, ne tre plaĉis al la gazetaro esperantista!”

La lingvoj liberecoj, kiujn la redaktoro enkondukis en la unuajn numerojn de „Espero Katolika”, estis privata afero de la redaktoro,

3) Oni atentu la etan lingvan kvazaŭ-plibonigon, kiun s-ro Auroux aplikis: ki' anstataŭ kia(ajn).

4) Vidu noton 3)

por kiu la direktoro rifuzis la respondecon; kaj kiam la unua poste pli ofte demonstraciis sian inklinon al lingvaj „plibonigoj” de la Zamenhofa lingvo, sacerdoto Peltier denove estis devigita al principa kaj grava decido: li komprenigis al Henriko Auroux, ke li „kompromitis la revuon”, kaj konsekvence la redaktoro donis sian ekŝiĝon el sia ofico, kiun sacerdoto Peltier vole-ne-vole devis akcepti.

Tiun decidon neeviteblan — la akceptebleco de „Espero Katolika” kiel esperanta revuo dependis de ĝi — la direktoro publikigis en la kvina numero de februaro 1904, kiel postnoto sub represo de „grava letero de doktoro Zamenhof” al sinjoro Seynaeve, la direktoro de la Belga Sonorilo, en kiu Zamenhof starigis jenan principon:

„Simile al ĉiu alia lingvo, Esperanto devas esti rigardata kiel lingvo finita kaj netuŝebla. Paroli pri iaj plibonigoj (se ili estos efektive necesaj) ni povos nur tiam, kiam nia lingvo estos jam oficiale akceptita en la tuta mondo” Ĝis tiu tempo, la netuŝebleco de la lingvo estas la plej fundamenta kondiĉo por nia propagando.” Kiom grava la direktoro de „Espero Katolika” juĝis la leteron de Zamenhof li ankoraŭ akcentis per aldono de oficiala deklaro:

„Ni tute aliĝas al tiu grava deklaro de l’ aŭtoro de Esperanto, „Espero Katolika” uzos kiel eble plej zorge la lingvon Zamenhofan laŭ reguloj kaj modeloj liveritaj de nia majstro.” Kaj admone — ankoraŭ valida eĉ por nun! — sacerdoto Peltier konsilis al la esperantistoj; „Cetere, Esperantistoj ne malŝparu tempon en etaj malpacoj. Ni ĉiuj laboradu frate, unuiĝe, fervore.”

La decido pri ŝanĝo de redaktoro ne restis sen rezultoj; la aliaj esperantaj revuoj jam baldaŭ akceptis nun „Espero Katolika” interŝanĝe kaj favore; prijuĝo samvalora al neoficiala aprobo de ĝia nova stato, en kiu sacerdoto Peltier unuigis en si la kvar funkciojn de direktoro, redaktoro, administranto kaj propagandisto.

DUAN FOJON MALSUKCESO

Intertempe la diskutoj pri la grupigo de la katolikaj esperantistoj en societon reviviĝis.

Kaj en la sesa (marta) numero de „Espero Katolika” 1904 Paŭlo Bavay publikigis leteron pri tiu temo, kiun li ordigis laŭ tri principoj: organo, grupiĝo, laboro... „tiu triuno allogas,” tiel li skribis, aldonante: „Sed ne sufiĉas, ke ni staru ĉiuj sub la sama standardo; ni bezonas ne sole organon, kiu ekzistas, ni bezonas ankaŭ ligojn, societiĝon. Grupiĝo alvokas societon: kiu sekvos tiun ideon kaj daŭrigos ĝin?”

La direktoro de „Espero Katolika” tuj serioze reakciis al la sugestoj, kiuj kvazaŭ riproĉis, kaj respondis:

„S-ro Bavay forgesis, ke ni unue penadis fondi Societon, kaj post kelkaj monatoj naskiĝis Revuo. Tiu revuo ja estas sendependa de la Societo kaj fondiĝis por esti malfermita al ĉiuj esperantistoj kaj opinioj. Ĝi restos tia. Sed ni tre bonvole akceptas, ke la Revuo fariĝu organo de la Societo, Ni eĉ deziras favori la Societanojn.”

Aldone sacerdote Peltier reprenis parton de la regularo de la unua societo, kun detalaj proponoj pri ĝia renovigado. De tiu momento li uzis ĉiufanken sian tutan, grandan, personan energion, por realigi la planojn por societo, kaj fine li, „post longaj klopodoj”, envere sukcesis trovi la — laŭ la franca leĝo necesajn — sep „Elektitojn”, nome: sacerdote Marius Hélie, paroĥestro en Lyon; Reneo Lemaire, el Epernay; Paŭlo Bavay, el le Havre; Lefevre, el Parizo; Devoucoux, el Alfortville; Campeau de Saint, el Parizo kaj Mistler el Saint-Claude.

La „Elektitoj” mem elektis kiel sian prezidanton: sacerdoton Hélie; kiel vicprezidanton: sinjoron Lemaire, kaj kiel sekretarion: sinjoron Mistler.

Sed... kvankam formale nun ĉio estis preparita por la ek-funkciado de formala societo internacia por katolikaj esperantistoj, bedaŭrinde ankaŭ ĉi tiun duan fojon tia societo ne atingis „la alian bordon”...! La kuraĝo de la iniciatintoj ankaŭ nun ne sufiĉis por krei konkretan kaj vivipovan enkorpiĝon de iliaj ardaĵaj deziroj: „Nur kelkaj katolikoj aliĝis al la Societo”, sacerdote Peltier poste konstatis.

La iniciatintoj starigis la leĝan kaj eksteran konstruaĵon por tia socio, sed... la internacia katolika esperantistaro denove ne sukcesis enverŝi vivigantan animon en la sendube laŭdindan projekton...

“...CENT SEMOJ PERDIĜAS, MIL
SEMOJ PERDIĜAS...”

La citado de la nomoj de kelkaj elstaraj fervoraj pioniroj el ĉi tiu unua periodo de la internacia katolika Esperanto-movado — kiu nur palpetante kaj hezitante serĉis pli realan kaj pli definitivan formon de organizaĵo — trovas sian rajtigon en la fakto, ke per la fervoro kaj persistemo de tiuj pioniroj la unuaj kluboj de katolikaj esperantistoj fondiĝis, kaj tiel certe pli firma bazo por plua evoluiĝo komencis formiĝi.

Tiel en Hispanujo Codorniu kaj Guinart sukcese pioniris; O'Connor en Anglujo; Mattelaer en Belgujo, kie li fondis klubon inter la katolikaj studentoj de la Lovena universitato; en Francujo Mistler en Saint-Claude organizis kursojn kaj fondis klubon; samtempe la „rajtigitoj” en Kanado, Aŭstrujo, Rusujo, Ĉilio kaj Meksiko brilis per modela kaj vigla aktiveco kiel katolikaj esperantistoj.

Ankaŭ sur financa tereno kelkaj nomoj estas nomendaj: tiuj de Ermano Gaudard el Besancon; de Paŭlo Tenneson el Parizo kaj de grafo Johano Chandon de Briailles el Epernay, kiuj en tiu kritika periodo per malavaraj mondonacoj helpis sacerdoton Peltier ŝanĝi unujaran deficiton de 400 frankoj al 150 frankoj; la lastan sumon la direktoro de „Espero Katolika” prenis je propra konto....!

Tia necerta financa pozicio kompreneble ne estis ideala, sed post kiam ankaŭ la dua klopodo fondi societon ne sukcesis, la direktoro de „Espero Katolika” nur povis elekti inter du ebloj: -haltigi definitive sian pioniran agadon pri speciala katolika Esperanto-movado; aŭ energie daŭrigi la historian taskon, kiun li prenis surŝultren, fondante „Epero Katolika” kiel monatan revuon.

Kun granda persistemo li de nun kontinuis sian penan kaj sendankan agadon, pri kiu li mem post unu jaro sincere konfesis: „La sukcesoj malmulte respondis miajn penadojn. Mi ricevis nur ĉirkaŭ 300 abonantojn por tiu unua jaro.”

Ne mirige ke tia senripoza aktiveco postulis multe, eĉ tro multe de la korpaj rezervoj de sacerdote Peltier. Li ja devis plenumi samtempe sian pastran oficon. Kaj li baldaŭ malsaniĝis.

En la jaro 1904 la sanstato de sacerdoto Peltier bedaŭrinde ree fariĝis ŝancela, kaj esperante trovi kompletan resaniĝon kaj samtempe pli da tempo por prizorgi „Espero Katolika”, li akceptis profesorecon en la seminario de Tours kaj mem ekloĝis en S. Radegonde.

Kvankam korpe lacigite, li entuziasme eniris tiun novan periodon en sia privata vivo, kiu ne plu estis pensebla sen „Espero Katolika”, sen propagando senhalta por lia idealo. Li travivis daŭre grandajn seniluziigojn, kaj kuraĝigis sin mem je tiaj momentoj per la vortoj de doktoro Zamenhof (la kanton li aŭdis dum koncerto): „...ĉu mi ne venkos en decida hor'!..., -Ho! mia kor'!...” Kaj kun ĉagreno sacerdoto Peltier aldonis: „La venko atendita ne venis, kaj mi malĝoje rediris alian poezion de l' majstro: „Ni semas kaj semas... Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas...”

La situacio envere fariĝis kritika.

La nombro de 300 abonintoj falis ĝis 250; kaŭze de multaj rifuzitaj kvitancoj post la dua jaro restis defcito de 700 frankoj. Tial la direktoro de „Espero Katolika” en la numero de januaro 1905 publikigis urĝan alvokon al la katolikaj esperantistoj, en kiu li donis skizon pri la preskaŭ ne plu eltenebla pozicio de la revuo.

Li senhezite konstatis: „La katolikoj ne devas forgesi, ke se ili volas havi specialan revuon, ili devas krei por ĝi legantaron per propagando senlaca en katolikaj familioj, firmoj, societoj, k.c.”. Kaj li ankoraufoje admonis: „Ne kontentiĝu trankvile legi vian revuon, sed ĉiu el vi fariĝu fervorega propagandisto; ĉiu el vi igu nin koni sian agadon por ke ni verku raporton legindan al la Kongreso.”

Sacerdoto Peltier celis per la lasta rimarko al la unua universala kongreso de la Esperanto-movado en Bulonjo-ĉe-Mar (Boulogne-sur-Mer), kiu tiumomente estis en intensiva preparo — la direktoro ludos elstaran rolon en tiu kongreso — sub la gvido de advokato Michaux el Bulonjo, kies cirkuleron kun peto pri „pensoj, ideoj pri l' afero” jam en la januara numero de 1905 sacerdoto Peltier respondis, i.a. proponante la kreadon de speciala komitato kaj de konkurso por alprenado de taŭga stenografia sistemo kaj enkondukon de universala poŝtmarko.⁵⁾

5) Jam proponita en „Espero Katolika” en majo 1904, 8-a numero.

„EN LA NOMO DE GRANDA IDEO”

Ni vivas en la jaro 1905...

En la ĉarma franca urbo Bulonjo-ĉe-Maró sabate la 5-an de aŭgusto proksimume 700 esperantistoj⁶⁾ el 22 diverslingvaj nacioj ĉeestis en la urba teatro la solenan manifestacion de la malfermo de la unua universala kongreso de esperantistoj, de „la Unua”: kiu malfermis tiun longan serion de universalaj Esperanto-kongresoj, kiuj en fiera sinsekvo elkreskis al simbolo de la tutmonda esperantistaro kaj al triumfo por la ideo de internacia helplingvo. Tiu Bulonja kongreso estis fajroprovo.

Edmond Privat konstatis en sia „Historio”⁷⁾ „Ĝi estis granda aventuro. Multaj trovis la aferon trofrua. nematura...” Nun ĉiuj tiuj sentimentoj, aspiroj kaj klopodoj palpetantaj, kulminiĝis en ĉi tiun realan kaj publikan teston: la reakcioj en la internacia presaro, la sukceso aŭ malsukceso. estus decidiga por la Esperanto-movado...

En la nomo de granda ideo....

Ĉi-rilate ni emfaze konstatu, ke por ties realigo je la evento de la Bulonja kongreso katolikaj esperantistoj, kaj sacerdoto Peltier kiel la plej elstara, alportis sufiĉe gravan apogon. La Bulonja kongreso ne estis privata afero nur de la neŭtrala esperantistaro.

La elkresko de tiu movado ja okazis tiamaniere, ke en tiu periodo fakte ĉiu esperantisto estis.... „esperantisto sen plu”; sen etiketo speciala de religio, de vivkoncepto. La ideo de enkonduko kaj propagando de Esperanto ankoraŭ estis la gvidsteloj por ĉiuj esperantistoj, sen distingo de grupo aŭ lando. Tiu ideo nevideble unuigis en tiu unua periodo de la Esperanto-movado ĉiujn adeptojn de la Zamenhofa lingvo: la ideo kiu nun subite ŝajnis vere realigebla: forigi per lingvo la sennombrajn miskomprenojn, kiuj dividis la popolojn en tiom da grupoj, nekompromisemaj kaj netoleremaj pri interesoj kaj aspiroj de aliaj.

6) Laŭ la raporto tiurilata en „Espero Katolika” de profesoro E. Lime la nombro estus estinta 1500. („Espero Katolika” de aŭgusto 1905, numero 20.)

7) Edmond Privat, „Historio de la lingvo Esperanto”, dua parto, paĝo 19.



Emile Peltier kiel juna sacerdoto

Estis la alloganta kaj fascinanta „verda standardo” sub kiu ĉiuj renkontiĝis en Bulonjo-ĉe-Marzo en 1905.

Pro la ankoraŭ tro malgranda nombro, ankaŭ la neŭtralaj esperantistoj ne jam urĝe sentis la bezonon de organizo en apartaj grupoj⁸⁾. Ankaŭ tiu fakto pruviĝis en la dufoje neakceptita ŝanco por la katolikaj esperantistoj, realigi apartan kaj propran organizadon en la formo de societo.

Tiel reteno kaj hezitemo en la sama grado estis simptomaj por la katolikoj kaj la neŭtraloj.

Estis Kabe⁹⁾ kiu kiel unua proponis en la Bulonja kongreso „organizadon internacian”.

Estis plene logike, ke la katolikaj esperantistoj intime partoprenis la kongreson en Bulonjo kaj dum la laborkunsidoj intensive miksiĝis en la debatoj, kaj alportis sian parton ne nur al la rekta sukceso de la kongreso, sed eĉ fundamente kaj decidige kunhelpis al la kreo de universala formo, en kiu la ĝenerala Esperanto-movado en proksima kaj postaj periodoj trovis sian definitivan organizan formon.

Precipe en la laborkunsido de mardo — 7.8.1905 — sacerdote Peltier, kiel reprezentanto de la katolikaj esperantistoj, prenis viglan parton en la diskutoj per siaj sugestoj kaj proponoj.

Post legado de la Kabe-raporto pri organizado internacia, sacerdote Peltier kiel direktoro de „Espero Katolika” petis diversajn principajn decidojn de la kongreso pri vere esencaj punktoj.

Tiel li demandis: „ĉu estis dezirinda „Centra Komitato”? Ne, „nur Lingva Komitato”, decidis la kongresoj ĉu „Tutmonda Ligo” esperantista aŭ „simpla federo de la nunaj societoj?”.

Al tio la kongreso respondis: „ke oni nepre ne volas Ligon, pro la danĝero de troa centralizo; ke eĉ federo estas ankoraŭ antaŭtempa”.

8) Pri tiu temo Edmond Privat en sia „Historio” (dua parto, paĝo 320) konstatis: „Ankaŭ tiu problemo bezonis dudek jarojn por trovi solvon. Nur fine la XVI-a en Vien decidis malŝarĝi la tagordon de la kongresoj je tiu afero de post 1924.”

9) Kabe = D-ro Kazimir Bein, el Varsovio, Pollando.

Oni scias, ke konklude de ĉi tiuj diskutoj la kongreso akceptis kiel bazon „Deziron” de Theophil Cart¹⁰⁾ „Ke la naciaj societoj esperantistaj pli interrilatigu ol ili faris ĝis nun”, rezervante por si „plenan sendependecon pri sia propagando kaj organizado”.

Estis profesoro E. Lime, kiu donis al ni ĉi tiujn detalojn pri la Buloŝa kongreso en detala raporto en „Espero Katolika” no. 20 de aŭgusto 1905. Li citas ankaŭ kortuŝan toaŝton „— post tiu de la protestanta pastro Sehneeberger — de sacerdote Emile Peltier, kiel direktoro de „Espero Katolika”, en granda festkunveno.

La tekŝto estis jena: —

„Karaj gefratoj. La koroj de ĉiuj tie ĉi estas plenaj je frataj ŝentoj. Sed ĝis nun oni parolis nur pri la frateco inter diversnacionoj. Mi esprimas la deziron, ke per Esperanto ankaŭ fratiĝu la diversreligionoj: ke ĉiuj pastroj, katolikaj aŭ protestantaj, hebreaj aŭ rusortodoksaj, per Esperanto unuiĝu por kune laboradi al la universala frateco. Mi povas certigi, ke „Espero Katolika” ĉiam klopodos atingi tiun celon”.¹¹⁾

10) Theophil Cart, profesoro de germana lingvo en junio 1901 esperantigis kaj precipe okupis sin pri novaj lernolibroj por Esperanto.

11) Vidu ankaŭ paĝon 21 (Ekumena agado).

„KUN BRAKOJ KRUCIGITAJ?”

Kompreneble la katolikaj esperantistoj ankaŭ aparte kun-venis en la Bulonja kongreso.

En tiu senco tiu kongreso akiris specialan historian signifon por la **2.33.84.235** internacia katolika Esperanto-movado.

Dimanĉe, la 5-an de aŭgusto 1905, la katolikaj esperantistoj ĉeestis en la preĝejo St. Nikolao S. Meson, en kiu ili unuafoje komune kantis esperantlingve, helpataj de grupo de dudek junaj kantistoj el la ĥoro de la preĝejo, kiu laŭ tiurilata raporto „ĝoje lernis la kantojn kaj afable helpis la fremdajn Esperantistojn en la kantado”.

La orgeno aŭdigis la faman „Himnon” de monsinjoro Dombrovski, poeto katolika. Por tiu himno J. Guivy komponis belan kaj solenan muzikon, kies strofojn ŝi mem kantis; same oni kantis la „Patron Nian”, laŭ muziko de sacerdoto Peltier. Bucciali, la blinda orgenisto de la preĝejo, lernis parkere la melodiojn.

Prediko en Esperanto ne okazis — kvankam la direktoro de „Espero Katolika” intencis fari tian — ĉar la episkopo de Bulonjo tion ne permesis; pri tiu fakto la raportinto poste skribis: „Centoj da Esperantistoj, ni povas diri, esprimis al la Direktoro de E.K. sian bedaŭron pri tiu malpermeso: ili ĉiuj intencis aŭdi la predikon...”

En la lernejo de la sama paroĥo, gastame disponigita de la paroĥestro Joncquel kaj de la lernejestro Stanislas, mardon la 8-an de aŭgusto la katolikaj esperantistoj havis sian apartan laborkunsidon.

Signifoplena estis tiu kunsido por la evoluigo de la internacia katolika Esperanto-movado, kvankam nur malmultaj vizitis ĝin pro samtempa ekskurso de la „granda” kongreso al Wimereux.

Aparta honorigo flanke de doktoro Zamenhof estis, ke li kvankam nekatolika, ĉeestis la meson.

Sed la viziantoj de la kunveno estis la plej fervoraj kaj plej aktivaj, la pioniroj, kiuj en la diversaj landoj energie, senlace kaj persisteme, agadis — kiel la „laborantoj de l’ unua horo” — por aparta katolika Esperanto-movado: inĝeniero Codorniu, „Elektisto” de „Espero Katolika” el Hispanujo; O’Connor, „Rajtigito” por Anglujo; Couraud; Devoucoux, „Elektisto” kaj „fervorega kunbatalanto” (vortoj de

sacerdoto Peltier); sinjorino Guivy; sacerdoto Laisney; Legay; sacerdoto H. Macon; Quèste; de Rey-Pailhade; SS. Thill; Vieilaard; Vignerou; fraŭlino Zabilon d'Her; Delaporte; Magner, kaj aliaj.

La aktuala temo de la frateco, kiu tiel varme trafluis la Bulonjan kongreson, estis principe pristudata de la direktoro de „Espero Katolika” speciale el vidpunkto katolika. Pri ĝi li memorigis: „ke la ideo de „frateco” estas tute katolika kaj parto de l' unua Ordon de Dio.”

Precizigante la starpunkton de la katolikaj esperantistoj li diris: „Ĉu ni hodiaŭ rigardos, kun brakoj krucigitaj, la novan dissemadon de l' ideo de „frateco”? Ĉu ni lasos la nekatolikojn disvastigi nian ideon, ne partoprenante tiun gravegan apostoladon? Ne”, tiel emfaze respondis sacerdoto Peltier, „ni devas esti la plej fervoraj pioniroj de la „frateco universala”, ĉar ĝi estas, sub alia nomo, la „amo al ĉiuj homoj, fratoj per Jesu-Kristo.”

Post ĉi tiu ekzakta kaj signifoplena priparolado de la bazaj kaj moralaj principoj, kiuj en la estonteco ĉiam estis la fiera flago, sub kiu la internacia katolika Esperanto-movado evoluiĝis al ĉiam pli granda matureco, sekvis legado de la „gravega dokumento”¹²⁾ pri la situacio de „Espero Katolika”. Sekvis emociplena diskutado, el kiu kristaliĝis la findecido, ke „ĉiuj la ĉeestantoj promesis energie bataladi por la vivo de E.K.”.

Tia „energia batalado” cetere jam tre baldaŭ fariĝis elementara vivkondiĉo por plua ekzistpovo de „Espero Katolika”.

12) „Espero Katolika” de aŭgusto 1905, numero 20, paĝo 77. 18

„MI REVAS...”

„Mi revas,” tiel sacerdoto Emile Peltier deklaris en „Antaŭparolo por la tria jaro”, „revuon grandan, centpaĝan monate, kiu havus klerajn korespondantojn en ĉiuj nacioj. En ĝi oni parolus pri la movado religia en la tuta mondo, pri la unuiĝo de la diversaj eklezioj (projekto tre kara al Papo Leono XIII-a) pri la teologiaj, filozofiaj kaj psikologiaj sciencoj, ankaŭ pri la socialaj demandoj nun tiel gravaj, tiel fundamentaj por la estonteco de l' homaro.” Pli detale Emile Peltier skizis siajn „revojn”: „En tia revuo oni kritike raportus pri la plej gravaj libroj kapablaj interesi la civilizitajn naciojn; pri la plej atentindaj artikoloj aperantaj en la naciaj gazetoj; pri la gazetaro kaj literaturo Esperantistaj. Tia revuo estus kiel spegulo de la katolika vivo. Ĉu ĝi ĉiam estos nur revo?.....”

La estonteco devus montri, kio enfakte estus realigebla de la viziaj ideoj de sacerdoto Peltier. Sed li fiksitis por si mem kiel imperativan mandaton: „Dum la nuna jaro mi redaktos E.K. laŭ tiuj principoj, ekrealigos tiun grandegan programon,”

Tamen..... pro la mizeraj financaj cirkonstancoj la 21-a numero de „Espero Katolika” aperis eĉ sen kovrilo.

Neeviteble tio liberigis la vojon al malpli favoraj reakcioj kaj komentarioj. En la novembra numero 1905 la konata katolika poeto monsinjoro A. Dombrowski^{*)} eĉ montriĝis profunde ĉagrena pri la afero. Li skribis: „Mi ricevis la n-on 21-an de E.K. Ĝi estas vera testimonium paupertatis (atesto pri malriĉeco!)... Vi revas pri „revuo granda centpaĝa monate”... Via revo estas ankaŭ mia revo. Sed kiel ĝin efektiviĝi? Vi varmege rekomendis la propagandon. Vi estas prava.

Sed kiel propagandi malgrandan folieton, kiel nia E.K.?”

Montrante al „Espero Pacifista” — 64-paĝa — sacerdoto Dombrowski donis kiel sian konvinkon, „ke per unu kajero 64-paĝa oni povus en unu monato varbi pli da abonantoj, ol per n-ro 21 daŭre la tuta jaro”. Tial lia konsilo al sacerdoto Peltier estis: „Volu altiĝi la jaran abonpagon ĝis 5 frankoj...” La respondo de sacerdoto Peltier estis propono

*) Vidu: „Enkonduko” kaj paĝ. 17.

al la legantoj de „Espero Katolika”, „altigi la jaran abonprezon ĝis 4 frankoj, por eldoni revuon de 32 paĝoj”, kaj li petis eĉ voĉdonon per poŝtkarto „kiel eble plej frue”.

En la sama numero li malfermis novan rubrikon kiel unu el la punktoj de „renovigo”: «Revuo de l' Esperantaj revuoj», en kiu estis preparolataj la tiam gvidantaj organoj: „Lingvo Internacia”; „Scienca revuo”; „Espero Pacifista” (septembra numero; 150-paĝa!); „Tra la mondo” kaj „L' Esperantiste”. Ke ankaŭ la nekatolikaj kaj neŭtralaj esperantistoj ne neglektis la heroan luktadon de sacerdoto Peltier por la ekzisto, plifirmigo ekonomia kaj plibonigo laŭkvalita kaj laŭnivela de „lia” revuo, kaj por honorplena pozicio inter la aliaj revuoj; kaj ke oni sincere laŭdis kaj rekonis liajn personajn meritojn, simptome montriĝis el raporto en „L' Esperantiste” de oktobro 1905. Ĝi traktis pri la universala kongreso en Bulonjo. En la raporto la kronikisto interalie deklaris: — „Ni tre deziras, ke la petega alvoko de tiu fervora kaj senlaca pioniro estu aŭdita kaj ke oni donu al li la monan rimedon por daŭrigi sian taskon. La nekatolikoj povas senlime deziri lian sukceson, ĉar Pastro Peltier vidigis sin tute ne kiel netoleremulo aŭ fanatikulo, sed kiel grandkora, homama kaj lerta esperantisto.”

EKUMENA AGADO

Nuntempe la Ekumena Agado, kiu strebas al la reunuiĝo de la kristanaj eklezioj, antaŭenmarŝas kaj trovis en la Ekumena Koncilo de 1962 en Romo kulminan punkton, sed antaŭ sesdek jaroj tiu agado praktike staris nur en sia komenca periodo.

Oni nur hezite parolis pri la temo, nesciante kiamaniere alproksimigi ĝin. Nur pli poste la agado fariĝis unu el la plej urĝaj aktivecoj de la Papoj. Tion pravas la fakto, ke la hodiaŭa Papo Johano XXIII rigardas la interkomprenon kaj rekondukon de la aliaj kristanaj eklezioj al la „Seĝo de Romo”, kiel unu el siaj plej gravaj aspiroj,

Kiel direktoro de „Espero Katolika” sacerdoto Peltier jam faris en sia toasto en la festkunveno de la Bulonja kongreso¹³⁾ varman alvokon al la ĉeestantoj, por ekkonsciiĝi pri la gravega rolo, kiun la lingvo de Zamenhof povus ludi kiel interhelpilo por la unuiĝo de la diverseklezianoj.

En sia „Antaŭparolo por la tria jaro” en „Espero Katolika” de oktobro 1905 li nomis la unuiĝon de la diversaj eklezioj „unu el la fundamentaj programeroj por realigi pere de la internacia revuo.”

Sed ne sufiĉis al sacerdoto Peltier instigi kaj sugestii, li praktike deziris efektiviĝi sian intencon, reale meti sian revuon en la servo de la ideo de ekumena agado. Por tiu celo aperis en la januara numero de 1906 la fama „Publika letero al ĉiuj pastroj kristanaj”, kun subtitolo: „Katolikaj, protestantaj, rusortodoksaj, grekaj, armenaj, k.c.” kaj la enkondukaj vortoj: „Karaj fratoj en Kristo”. La teksto estis jena:

„En la neforgesebla Kongreso de Boulogne, mi deziris, en toasto, la unuiĝon de la diversreligianoj per Esperanto. La deziroj estas vanaj, se ili ne eksteriĝas en realecon per agoj. Hodiaŭ mi proponas al vi ekrealiĝon de tiu deziro, entuziasme akceptita kaj aplaŭdita de la ĉeestintaj kongresanoj en Boulogne.

Ŝajnas al mi, ke la unua paŝo farinda estas la reunuiĝo de la kristanaj religioj. Multaj kredoj, preĝoj, esperoj, estas komunaj al ĉiuj kristanoj. Nur malmultaj punktoj estis, en estinto jam malproksimega,

13) Vidu paĝon 16.

kaŭzoj de malunuiĝo inter ili. Ĉu vi ne pensas, ke nun alvenis tempo, kiam oni povas paceme unuiĝeme kaj frate, kun animo tute senigita de l' tiamaj pasioj, ekzameni tiujn malnovajn malkonsentojn?

Ĉu ne io mirinda, bedaŭrinda, malaperinda, ke disĉiploj de tiu, kiu ordonis: „amu vin reciproke”, daŭrigas sin reciproke malami pro malpacoj alvenintaj antaŭ kelkaj jarcentoj!”

Kaj sacerdoto Peltier daŭrigis:

„Ni ĉiuj deziras alvenon de Krista regno; ni ĉiuj laboradas por morala progresado de l' homaro; ni ĉiuj estas pretaj oferi niajn tutajn fortojn, nian tutan vivon, por tiuj noblaj celoj. Kial do ni pli longe restus malunuiĝitaj, ĉiuj aparte laborantaj, rifuzante koni kaj helpadi la laborojn de l' aliaj?”

Sekve sacerdoto Peltier formulis siajn ideojn pli precize:

„Mi hodiaŭ, kun sincereco plej vera, kun koro esper- kaj amo-plena, faras unuan paŝon por iri renkonte al vi, por al vi proponi interparoladon amikan pri niaj sanktaj priokupoj. Vi amike min akceptos, ĉu ne? Kaj nia unuiĝo estos ja la plej glora kaj fruktodona de Esperanto!

Unue devos estiĝi unuiĝo de la Esperantistaj pastroj kristanaj, por kune studadi la demandon kaj difini la rimedojn uzindajn por atingi la celon. Mi esperas, ke la pastroj el ĉiuj kristanaj religioj respondos mian alvokon, sendante al mi sian nomon kaj aliĝon al l' ideo de unuiĝo.”

Fine sacerdoto Peltier ankoraŭ aldonis: „Eĉ se ni estos nur deko, nur trio...., mi promesas, ke mi de nun neniam forlasos tiun grandan celon. Kiam la unuiĝemaj pastroj sin konos reciproke, per publikigo en E.K. de la aniĝantaro, ni pensos pri la dua paŝo farota.

Mi atendas vin, fratoj....

Em. PELTIER. Dir, de E.K.

P.S. Mi esperas, ke la gazetoj esperantistaj bone volos presigi tiun ĉi avizeton: „Pastroj el ĉiuj religioj estas petataj legi la n-on 24 an de „Espero Katolika.”

La Publika Letero de sacerdoto Peltier ne restis sen reakcioj! En la marta numero 1905 publikiĝis la unuaj leteroj envenintaj responde al la alvoko, Ili formis mozaikon kun riĉkoloraj pecetoj kaj ankaŭ kontraŭstaraj opinioj.

El Zoersel (Belgujo) C. J. van Oevelen respondis: „Kiu dubas, ke inter la pastroj ankaŭ alireligiaj estas multaj, kiuj verege nur celas la bonestadon de siaj kunreligianoj? Se do tiuj bonaj elementoj kuniĝos por la sama celo, baldaŭ, almenaŭ laŭparte, la granda celo estos trafita”.

Voĉo el Draguignan (Francujo) venis de sacerdoto Requin, kiu konfesis, ne klare kompreni tion kion sacerdoto Peltier volis. Li skribis: „Certe mi deziras kun pastroj diverskristanaj fratiĝi, sed kvankam atente la publikan al pastroj leteron mi estas leginte, mi ne perfekte komprenis efektojn de tiu frateco. Kiun celon vi esperas atingi? ĉu nur amikan interparoladon?

Tio estas facila. Sed ĉu vi povos ebenigi malpacojn en dogmaro? Mi ne esperas. Jen estas tamen, ŝajnas al mi, sola kaj vere dezirinda celo. Pardonu mian sincerecon; eble mi tute ne komprenis vian penson, sed mi aprobas la „Unuiĝon”¹⁴⁾

Reakcio plua envenis de doktoro Vallienne el Parizo, kiu esprimis sian timon pri malsukceso opiniante ke li — sacerdoto Pekier — volis: „varbi sub speciala standardo la ĝeneralecon de la kristanaro”. „Katolikismo”, laŭ doktoro Vallienne, „estas nur ero en la aro kristana, kaj ĉiuj, kiuj ne konsentas pri la formulaĵo katolika, kiuj kontraŭe akceptas formulaĵon ne konsentitan de la katolikestro, devige restos, eble kun bedaŭro, sed tamen restos ekster nia tendaro.”

Li proponis: „Laŭ mia opinio, se ni volas sukcesi, la titolo mem de nia revuo estas ŝanĝota: anstataŭ la vorto „Katolika”, kiu ŝajnas iom sekta, metu la vorton «Kristana»: kaj sendube vi altiros al vi la tutan religian homaron. Tia revo estas sufiĉe alloga, -por entuziasmigi apostolon, tiel amplanan al la supera religio kiel vi”.

Eble la plej grava reakcio venis el Soham (Anglujo) de John Cyprian Rust, pastro de la angla ŝtateklezio, kiu, kun sia edzino, ĉeestis la festkunvenon en la Bulonja kazino kaj tie aŭdis la elokventan pledadon por kristana frateco de la direktoro de „Espero Katolika”.

La anglikana pastro dividis sian respondon en du partojn. En la unua parto — la plej konsenta — li skribis: „Mia koro jese respondas al

14) Publikigita en „Espero Katolika” de aŭgusto 1905, numero 20, Paĝo

viaj sentoj, viaj esperoj, viaj preĝoj. Se per nia kara lingvo la dividi-taj servantoj de nia unu Sinjoro povus alproksimiĝi nur kelkajn paŝojn unu al alia, tia frukto de niaj klopodoj estus vere benplena kaj glora.” Kvankam ankaŭ por pastro Rust la intencoj de sacerdoto Peltier ne estis tute klaraj, li tamen senrezerve skribis al li: „...sed mi kore al-igās al viaj ideoj”.

En la dua parto de sia reakcio pastro Rust atentigis „pri unu ebla danĝero”, tion formulante jene: „Eble en via eklezio — eble inter ĝia estraro — oni trovos kelkajn dogmamantojn kiuj diros: „Kiel? frateco kun herezuloj dum ili restas obstinaj en sia herezo! Tio ne estas permesebla al katolikoj; kaj se tiu ĉi lingvo estas pero de tia malbona frateco oni devos malpermesi al katolikoj lerni ĝin” Same rilate la protestantojn pastro Rust timis: „Mi pensas, ke eble kelkaj protestantoj dirus: „Jen tiu ĉi nomita helpa lingvo! Ĝi ne helpas sim-ple la internacian komunikadon, sed la ruzojn de tiuj kiuj deziras de-nove submeti nin al la juĝo¹⁵⁾ de Roma tiraneco”.

La direktoro de „Espero Katolika” detale respondis al supraj leteroj en la numero de marto 1905, pli konkrete skizante siajn intencojn.

„Mia celo,” tiel li klarigis, „atingota kredeble nur post longa tempo, estas la reunuiĝo de la diversaj kristanaj eklezioj.” Samtempe li ener-gie forĵetis la kulpigon, ke oni povus riproĉi al lingvo, ĉi-kaze Esper-anto, la uzadon por tiu celo.

Li demandis; — „Sed ĉu Esperanto estas amuzilo! Ĉu ĝi estas uzebla nur por interŝanĝo de poŝtkartoj? Aŭ ĉu Esperanto estas utiligebla kiel progresilo por la homaro?”

Sacerdoto Peltier konstatis: — „Esperanto estas neŭtrala lingvo, ne-nies propraĵo”¹⁶⁾ Kaj plue: „Oni ne pli devas kulpigi Esperanton pro la ideoj disvastigitaj per ĝi, ol oni kulpigas la elpensinton de la pres-arto pro sama kaŭzo.”

Poste la temo pri la reunuiĝo de la kristanaj eklezioj ankoraŭ plur-foje, kaj en diversaj formoj, aktualiĝis en la redakcia agado de „Espero Katolika”, poste sub la respondeco de I.K.U.E.¹⁷⁾.

15) „Juĝo” verŝajne preseraro. Devas esti „juĝo”.

16) Laŭ la Bulonja Deklaracio de d-ro Zamenhof.

17) Espero Katolika” fariĝis la oficiala organo de IKUE en 1910.

En rilato al supra skizo ni nur konstatu, ke la iniciato de sacerdoto Emile Peltier estis kuraĝa.

Ĝi estis ideala pruvo pri la katolika vigleco, je kiu li kondukis sian revuon, kaj pri la apostola ardo, per kiu li deziris akceli internacie la tutmondan kristanisman laŭ katolika senco.

„Mia celo, atingota kredeble nur post longa tempo....”

Envere ne antaŭ 1962 la internacia gazetaro publikigos komunikojn pri oficialaj reciprokaj vizitoj de katolikaj kaj anglikanaj altrangaj ekleziuloj. Kaj okazos la Ekumena Koncilo en Romo, en kiu partoprenos ne nur pli ol 2000 katolikaj episkopoj kiel „koncilpatroj”, sed kiel „observantoj” anglikanaj kaj rusortodoksaj teologoj kaj patriarkoj.

Dank' al la apostola kaj historia iniciato de Papo Johano XXIII.

Ĉi-loke ni konstatu objektive, ke ja ne estis teologie ĝuste, kion sacerdoto Peltier skribis 1906 en sia Publika Letero rilate la diferencojn kaj malfacilaĵojn inter katolikoj kaj aliaj kristanoj, dirante: „Nur malmultaj punktoj estis, en estinto jam malproksimega, kaŭzoj de malunuiĝo inter ili”. Kaj ankaŭ la uzita esprimo „malkonsentoj” ne ekzakte precizigis la grandajn teologiajn diferencojn inter la katolikoj kaj „la aliaj”.

Kiom grandaj tiuj diferencoj ankoraŭ estas eĉ nun, 57 jaroj post publikigo de la Publika Letero de Peltier, klare montriĝas el la Dua Vatikana Koncilo de Romo 1962/1963, kies programo por la kunsidoj en 1962 ne entenis pritrakton de tiu reunuiĝo, kvankam unue, post la anoncado de la Koncilo, multaj atendis aŭ almenaŭ esperis tion.

Jen vortoj de Papo Johano XXIII mem:

„La dua Vatikana Koncilo volas atesti laŭeble plej publike kaj plej amplekse pri la signifo de Kristo kaj Lia doktrino por la homaro — ĉiuepoke kaj nuntempe pli ol iam — kiel lumo kaj saĝo, kiel gvido kaj instigo, kiel konsolo kaj merito de homa sufero en tiu ĉi vivo surtera, kaj kiel garantio de la feliĉo eterna.”

Doktoro Ch. Niederer S.J. eksplikis la signifon de la vortoj de Papo Johano XXIII pli detale en artikolo en la nederlanda katolika porinstruista revuo „Ons Eigen Blad” (Nia Propra Revuo).

„Tiun ateston devas trariligi precipe la plena unueco propra al la Eklezio. Estas evidente la intenco de la Papo atesti per la Koncilo al

la tuta mondo, kaj tre speciale al la „disigitaj kunfratoj”, pri la admirinda unueco de la Eklezio. Tio estas kaj restas unu el la grandaj karakterizoj, kiun Kristo mem donis al Sia Eklezio, kaj per kiu la mondo povas vidi, ke la katolika Eklezio estas efektive la Eklezio de Kristo.” Ke tamen la Roma Koncilo apelacias forte al la nekatolikaj kristanaj grupoj, malgraŭ la evidenta limigo de la laŭprogramaj celoj, ne estas mirige. Ĉar trafe montriĝis en la unuaj kunsidoj, ke la plena unueco de la katolika Eklezio samtempe entenas la liberecon de la unuopaj Koncilpatroj, esprimi diferencajn opiniojn pri gravaj temoj, ekz. de ekspliko kaj diversnacia praktikado de la liturgio.

La diferencaj opinioj eĉ tiel publike aperis, ke en komentarioj gazetaraj pri la jam okazintaj kunvenoj oni plurfoje povis legi pri divido en du grupojn, en „romananoj” kaj en „transalpanoj”.

„Kie restas la atesto pri unueco?”, d-ro Niederer S.J, demandas, kaj tuj donas la respondon:

„Tiu atesto pri unueco iĝas precipe videbla en kaj super la diverseco de opinioj, La Eklezio ne estas unuigo de personoj, kiuj sen propra opinio kaj konvinko blinde kredas tion, kio de ie supre estas ordonata. Kristo konstruis Sian Eklezion el tiom da diversaj membroj kiom estas kredantoj. La mistero de la unueco ne troviĝas en uniformeco aŭ en unutona ripeto de ĉiama samo. Ĝi troviĝas ĝuste en la tuto konsistanta el tiom da diversaj partoj.”

Tiu impresio ankaŭ pleje formis la reakciojn de la nekatolikaj „observantoj”, kiuj nun dum la Roma Koncilo, ankaŭ havis la eblon de rekta kaj plej persona kontakto kun la admirinda „unueco en diverseco” de la katolika Eklezio.

Cetere — en speciala „Koncilo-Letero al ĉiuj episkopoj de la mondo” — la letero estis datita je Epifanio, tago de la „Apero de la Sinjoro al la paganoj” — Papo Johano sciigis, ke post la 3-jara preparo kaj la unua koncilparto en 1962, nun la definitiva proceduro por la dua koncilparto estos fiksata en la koordiga komisiono,

Kaj la Papo aldonis, ke la disvolviĝo de la Koncilo kaj la pli larĝa dimensio, kiun ĝi prenis pro la eksterordinara atento por ĝi ankaŭ ekster la katolika Eklezio mem, devigis la Koncilpatrojn, ŝanĝi la celojn metitajn. Unue la celo estis precipe: interna adaptigo al la nuntempaj cirkonstancoj. „Tio estis ankaŭ la plej grava celo, kiun ni

kredis realigenda". Laŭ la Papo la intereso por la Koncilo, montrita en la publikaj reakcioj de la nekatolika mondo, kiel ankaŭ la granda alproksimiĝo kaj la kunvivo de ne-katolikoj kun la Koncilo, devigis la Koncilpatrojn, plilarĝigi la celojn de la Koncilo. „Alie ni ne komprenos la intencojn de Kristo”, tiel Papo Johano en supre citita Koncil-letero, kiu aperis fine de januaro 1963 en la mondgazetaro.

Por reveni al la „Publika Letero”, kiun sacerdoto Emile Peltier publikigis en 1906:

Sendube ni eksplikas ĝuste la intencojn de sacerdoto Emile Peltier, dirante, ke li publikigante sian Publikan Leteron en „Espero Katolika” en 1906, certe unualoke volis akceli la personan kaj pli intiman kontakton inter katolikoj kaj aliaj kristanaj grupoj.

Por tiu tempo nekontesteble kuraĝa kaj apostola iniciato.

La unuaj ekumenaj publikigaĵoj de sacerdoto Emile Peltier aperis nur du jarojn, post kiam Don Angelo Roncalli, poste Papo Johano XXIII, la 10-an de aŭgusto 1904, sacerdotiĝis en la preĝejo de Sankta Maria de Monte Santo, kaj unu tagon poste celebris sian unuan Meson en la Petro-Baziliko.

Post tiu solenaĵo la juna sacerdoto Roncalli, kun grupo de pilgrimoj, genuis antaŭ Papo Pio X, kiu kiel unua Papo tiom forte apogis la celojn de la katolika esperantista movado kaj donis en 1906 al la fondinto-direktoro de „Espero Katolika” sian papan benon.

– Oni pristudu ankaŭ la prelegon pri „La Ekumena Koncilo kaj Esperanto”, kiun faris Patro H. G. Wannemakers S.J. en la 29-a IKUE-kongreso de Romo 1962. La kompleta teksto estas publikigita en „Espero Katolika” de oktobro kaj novembro 1962.

– Je la presado de tiu-ĉi broŝuro — fine de majo 1963 — la Vatikano publikigas informojn pri tre grava ekmalsaniĝo de Papo Johano XXIII. Oni timas pri la vivo de la papo. Se Papo Johano mortus, tiukaze eventuala daŭrigo de la Roma Koncilo dependos de la decidoj de la novelektota papo.

BENO DE PIO X

Novan mejloŝtonon al la poresperanta vivo de sacerdoto Peltier alportis la dua parto de 1906.

En junio de tiu jaro la direktoro de „Espero Katolika” ricevis de Louis de Beaufront¹⁸⁾ jenan letereton: „Sendu rapide plenan kolekton de „Espero Katolika” al monsinjoro profesoro Luigi Giambene en Romo» Li prezentos ĝin al Lia Papa Moŝto¹⁹⁾ kun mia preĝareto”. Monsinjoro Giambene estis prelado en Romo kaj sekretario de la grupo esperantista Roma «Imperiosa Civitas», Kompreneble sacerdoto Peltier senprokraste plenumis la peton de L. de Beaufront.

La 2-an de junio 1906 monsinjoro Giambene estis allasata en privatan aŭdiencon ĉe Papo Pio X kaj en letero, kiun li skribis la saman tagon al sacerdoto Peltier, li donis detalan raporton.

„La Sankta Patro min tre afable ricevis hodiaŭ matene. Li akceptis vian laboraĵon. Li legis laŭte (sed, kompreneble, malkorekte) la poemon de Dombrowski²⁰⁾, kiu estas en la unua numero, dirante ĉe ĉiu verso: Mi komprenas! Mi prezentis esperante skribitan peton de Beno, por vi kaj la redaktoroj de E.K. Ankaŭ ĝin Li (Pio X) legis laŭte, kaj poste diris: Mi ne skribas nun; sed mi sendos al vi skribaĵon pri tio”. Monsinjoro Giambene finis sian leteron al sacerdoto Peltier jene: „Sendube tio estos gravega dokumento. Sed estas necese, ke ni ankoraŭ silentu pri mia vizito al la Papo... Tuj kiam mi havos novaĵojn, mi skribos ree al vi. Nun ni silentu, preĝu kaj esperu!”

Periodo de atendo sekvis, tiel por monsinjoro Giambene kiel por sacerdoto Peltier; kaj ili demandis sin: „Kia estos la skribaĵo, kiun Pio X promesis, kaj... kiam ĝi venos...?”

Ĉar intertempe la dua Universala Esperanto-kongreso estis proksima, la malferma dato estis la 28-a de aŭgusto 1906. La urbo, en kiu ĝi okazus, estis la internacia centro Ĝenevo.

18) Vidu. paĝon 6.

19) PIO X.

20) La Poemo: „Al Lia plej sankta Moŝto Papo PIO Xa” el la unua numero de „Espero Katolika”, unua paĝo.

Kiel ni jam akcentis pri la universala kongreso de Bulonjo-ĉe-Maró: granda estis la intima ligiteco, kiu ekzistis en tia unua periodo inter la katolika esperantista vivo kaj tiu de la ĝenerala Esperanto-movado.

Ankaŭ en Genevo la katolikaj esperantistoj deziris kongresi kun „la aliaj”. La Ĝeneva kongreso estis por ili de same grava signifo kiel por ĉiuj aliaj esperantistoj.

Tial papa aprobo pri la celoj de la internacia katolika Esperanto-movado estus egale grava por la ĝenerala movado kaj por la sukceso de „la Dua” en Ĝenevo.

Ĝuste la 28-an de aŭgusto 1906, je la malferma tago de la Ĝeneva kongreso, sacerdoto Emile Peltier ricevis kopion de la sekvanta letero itala de la Vatikano:

Dal Vaticano, 27 Giugno, 1906.

Illmo e Rmo Monsignore,

Ho l'onorevole incarico di significarle che il Santo Padre si è benignamente degnato accogliere con particolare gradimento i numeri pubblicati della Rivista Espero Katolika, che Ella Gli umiliava da parte del Sac. I. Emilio Peltier. Voglia la S. V. Illma e Rma compiacersi di partecipare al prefato Sacerdote il Sovrano gradimento e la Benedizione Apostolica, che Sua Santità ha impartito al medesimo ed ai redattori della Rivista. Eseguiti gli ordini ricevuti, passo con sensi de profondo ossequio a professarmi,

Di V. S. Illma e Rma

All' Illmo e Rmo Mons.

Luigi Giambene

Roma.

Devotissimo Servo

Giovanni Bressan.

La esperanta traduko en „Espero Katolika” de oktobro 1906 estis jena:

„El la Vatikano, la 27-an de junio, 1906.

Via tre respektinda Monsinjora Moŝto.

Mi ricevis la honoran komision sciigi al vi, ke la Sankta Patro favor-

anime kaj kun speciala plaĉo bonvolis akcepti la aperintajn numerojn de l' Revuo Espero Katolika, kiun vi humile prezentis al Li je la nomo de l' Pastro Emilo Peltier. Bonvolu Via tre respektinda Monsinjora Moŝto konigi al la nomita Pastro la Papan plaĉon kaj komuniki la Apostolan Benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de l' Revuo.

Plenuminte la ricevitaĵajn ordonojn, kun la sentoj de grandega estimo mi diras min De Via Respektinda Moŝto

Tre sindonema Servanto

Al Lia tre Respektinda Moŝto
Monsinjoro Luigi Giambene
Romo.

Giovanni Bressan.

Rapide la novaĵo pri la papa beno disvastiĝis inter la kongresanoj de „la Dua”, kaj la direktoro de „Espero Katolika” ricevis multajn gratulojn de ĉiaj samideanoj, katolikaj kaj ne-katolikaj.

Franca traduko de la vatikana letero estis sendata al ĉiuj gazetoj en Ĝenevo, kaj ĉiuj publikigis ĝin.


Sacerdoto Peltier mem, ĝojoplene, skizas la reakcion inter la kongresanoj de „la Dua” en „Espero Katolika” de oktobro 1906, „Dum la sekvantaj tagoj, multaj esperantistoj esprimis la deziron, ke la Letero Papa estu legata dum ĝenerala kunsido de l' Kongreso, tial ke ĝi alportas al Esperanto grandan kaj ŝatindan helpon. Laŭ tiu deziro, la Prezidanto de l' Kongreso, Pastro Schneeberger, protestanto, komunikis la Leteron al la Kongresanoj, la vendredon, en la kunsido matena. „Niaj amikoj, la katolikoj, diris la Prezidanto, ricevis de l' Papo altan aprobon kiun mi komunikas al la Kongreso”.

Kaj sacerdoto Peltier en supra skizo daŭrigis:

„La legado de la Letero estis salutate per unuanimaj kaj longaj aplaŭdoj de l' Kongresanoj. S-ro Carlo Bourlet, kvankam liberpensulo, deklariis, ke tiu fakto estas tre grava por la progresado de Esperanto kaj ke li ĝin tre plezure aplaŭdas, Li esprimus la deziron, ke la anoj de aliaj religioj aŭ filozofioj same klopodu por ricevi similan aprobon de la estroj, por montri ke Esperanto estas vere neŭtrala lingvo, kiu povas kaj devas utili al ĉiuj partioj kaj ideoj- Tiu deklaro estis ankaŭ aplaŭdata”.



Sacerdoto Emile Peltier kiel profesoro
kaj direktoro-redaktoro de „Espero Katolika”



SANKTA PAPO PIO X
kiu diris pri la internacia lingvo:
„Esperanto havas antaŭ si grandan estontecon.”

Nepriskribebbla estis la entuziasmo, kiun la papa beno ekflamigis en la koroj de la katolikaj esperantistoj. kunvenintaj por ĉeesti la Ĝenevan kongreson.

En aparta kunsido je vendredo, la 31-a de aŭgusto, ili danke aplaŭdis proponon pri forsendo de danktelegramo al Pio X kun sekvanta teksto: „La katolikaj Esperantistoj, kunsidantaj en aparta kunveno, dum la II-a kongreso de Esperanto, en Ĝenevo, sendas al la Sankta Patro la esprimon de sia respektoplena dankeco pro la Apostola Beno sendita al Espero Katolika”.

Kaj al la ĉefepiskopo de Tours, Lia episkopa Moŝto Renou, ili sendis telegramon, kiu tekstis: „La katolikaj Esperantistoj, kunvenintaj dum la Kongreso de Esperanto, en Genevo, ricevinte la Apostolan Benon, sendas la esprimon de sia dankeco al Lia Moŝto Mgr. Renou, kiu la unua donis aprobon al „Espero Katolika”.

La papa beno ne estis la ununura historia fakto en 1906, kiu profunde ĝojigis la katolikajn esperantistojn, kaj precipe la fondinto-direktoron de „Espero Katolika”.

En vizito al la ĝenerala vikario de Ĝenevo sacerdoto Peltier ricevis permeson por prediki en Esperanto en la Meso, okazonta dimanĉe la 2-an de septembro. La direktoro de „Espero Katolika” poste klarigis pri tio: „la Ĝenerala Vikario mem tion proponis”. Tiu meso estis celebrata en la preĝejo S. Francisko de sacerdoto Guinard, la aktiva vicprezidanto de la Hispana Societo; sinjorino Guivy — kiu ankaŭ kantis en la Meso en Bulonjo-ĉe-Marzo en 1905 — faris tion nun same, denove kantis la „Patro Nia” kun delikata sento kaj stilo perfekta, laŭ la esprimo de Ĝeneva ĵurnalo. Kaj estis Emile Peltier, kiu post la legado de la Evangelio faris predikon en la internacia lingvo Esperanto, „la unuan fojon en la mondo”, kiel deklaris „Espero Katolika” de oktobro 1906.

Kaj la raportinto aldonis ankoraŭ:

„Emocio komprenebla vidiĝas sur lia vizaĝo, kiam li supreniras al la predikejo”.

La ĉefpunkto el la prediko kulminiĝis en la vortoj neforgeseblaj: „Hodiaŭ estas kvazaŭ la bapto de Esperanto. Al ĝi ja estos fidataj ne vivoj de korpoj, sed vivoj de animoj; per ĝi la ideoj rapide disvastiĝos en la mondon kaj povos aŭ vivi aŭ mortigi la animojn.” Kaj pri la

apostola beno: „La Apostola Beno estas por Esperanto kiel bapto sankta, kaj ni, katolikoj, uzos la internacian lingvon nur por sanktaj celoj kaj por la morala bono de l' homaro”.

Ni finu ĉi tiun skizon pri tiu feliĉa periodo el la poresperanta agado de sacerdoto Peltier, citante leteron de nekatolika esperantisto, nome de N. P. Evstifeieff, kiu sendis al la direktoro de „Espero Katolika” bankbileton de 100 kronoj, kun letero datita: „Mürren, en Svisujo, II-a Kongreso 4-IX-06:

„Tre estimata S-ro Redaktoro!

S-ro C. Bourlet tre bone esprimis impreson de ĉiuj nekatolikaj esperantistoj, kiam li gratulis vin kaj ĉiujn ĉeestantojn pro la meritita sukceso atingita de vi en la formo de la plej alta aprobo, kiun vi povus atendi kaj celi.

Observante jam delonge vian sindoneman penadon atingi la celon unufoje elektitan, mi admiradis ĉiam vian fidelecon al la signoj de „l' espero, l' obstino kaj la pacienco”...

Laboro meritas sukceson, sukceso elvokas laŭdon; la plej efika laŭdo estas subteno.”

La letero daŭrigis:

„Vi, estimata redaktoro, donis al ni, aliaj esperantistoj, imitindan kaj kuraĝigan ekzemplon, ni do devas vin rekompenci per subteno de via sindona kaj kuraĝa celado antaŭen! Estu ĉiuj viaj aliaj revoj kaj projektoj tiel same efektivigitaj, kiel la unua, kiu, kiel multsignifa surprizo mirigis nin agrable ĉe nia dua kongreso.

Ho, se ĉiuj estus tiom sincere kaj tiom serioze persekutantaj „la voj' elektitan”, ni — la aliaj — sendube atingus la rezultatojn, rekompencindajn kaj rekompencigajn! Efektive, kiu helpas sin mem, tiun la Dio helpas laŭ la proverbo.

Tial ni ĉiuj laboru kaj esperu!

Via dankema,

N. P. Evstifeieff.

P.S. — Bedaŭrinde la ŝuldo, kiun vi kuraĝe faris por plifortigo de via entrepreno, ne malaperis en la tempo, kiam vi ricevis la pruvon de

plena laŭceleco de via kuraĝa ago. Tial bonvolu akcepti de malnova esperantisto laŭfortan helpon en malestiminda formo de l' mono aldonita.

La sama N. P. Evs.

Mürren, en Svisujo, II-a Kongreso 4-IX-1906”

Kia trafa atesto supra letero estis — ni ripetas: de ne-katoliko! — pri sacerdoto Emile Peltier, pri ties signifo kiel pioniro de la katolika kaj de la ĝenerala Esperanto-movado; pri lia nobla karaktero kaj pri lia persisto nelacigebla en la realigo de la celoj alstrebitaj de li; pri liaj agadoj apostolaj kaj kristanaj.

„KELKAJ KLARIGOJ...”

Ĉu la laboroj kaj la travivitaj emocioj de „la Dua” estis tro streĉaj por la daŭre ŝancela sanstato de la direktoro de „Espero Katolika”?

Kiel ajn estu, ĉiukaze en la novembra numero de la revuo aperis jena informo:

„Pro malsano (ne grava) de l’ Direktoro, tiu numero aperas ankoraŭ malfrue, kaj enhavas nenion pri la nuna religia batalado, aŭ «kultur-kampfo», en Franclando, La decembra numero, espereble, kontentigos niajn legantojn”.

Kaj pli eksplikaj — fakto pli tragika — estis la „Kelkaj klarigoj”, kiujn sacerdoto Peltier publikigis en la decembra kajero 1906:

„La legantaro de E.K. konstatis, de kelkaj monatoj, malfruon en la apero de la Revuo, kaj plendis al la Direktoro; aliaj ne plendis skribe, sed kredeble plendis enkore... Klarigoj estas do necesaj. Mi ofte diris en E.K. ke mi devas zorgi pri ĝi ekster miaj profesiaj devoj. Mi ne estas escepto: preskaŭ ĉiuj batalantoj de Esperanto sammaniere agas. Sed tiuj, kiuj konas min, kiuj vidis min ĉe la kongresoj, scias ke mi ne estas korpe „fortulo”! Okazis do, ke la laboro ĉiam pligrandiĝis, de tri jaroj, kaj ke samtempe miaj fortoj ne pligrandiĝis... eĉ kontraŭe etiĝis!

Depost la lasta kongreso mi estis ĉiam malbone fartanta. De l’ komenco de decembro, mi estis tute malsana. Mi iom resaniĝis fine de decembro, kaj tial povis fini la verkadon de E.K. novembra. Poste mi denove remalsaniĝis kaj estas ankoraŭ tre malforta.

Ŝajnas do, ke tiu stato ne povos daŭri tre longe: aŭ mi devos min dediĉi plene al Espero Katolika kaj al la disvastigo de Esperanto inter katolikoj, — kaj tio estas mia plej ega deziro; aŭ mi devos tute forlasi E.K. kaj Esperanto'n, por plenumi miajn profesiajn devojn.” Sekve sacerdoto Peltier demandis al la legantoj de „Espero Katolika”: „Kion do mi faros! Mi ĝis nun nescias. Tio dependas de vi, karaj legantoj. Se mi povos vivi sole per Espero Katolika; se mi povos forlasi la oficon de profesoro, mi elektos la unuan vojon. Por tio estas necese, ke ni duobligu l’ abonantaron kaj mi liveras al vi rimendon, sur la flava folieto enmetita en tiu ĉi numero de E.K. Se mi ne

povos vivi per E.K. pro la nesufiĉa nombro de abonantoj; tiam mi devos forlasi E.K. kaj tio estos por mi fortega ĉagreno, kaj kruela frapo al mia koro”.

La „flava folieto” tamen ne alportis en sufiĉa grado la de sacerdoto Peltier tiom arde deziratan solvon de la financaj problemoj. La januara numero 1907 de Espero Katolika enhavis la informon: „La Direktoro de E.K. iom post iom resaniĝas. Li esperas aperigi DU numerojn monate por ke la revuo estu ĝustatempa. Baldaŭ reaperos la ordinaraj rubrikoj”. (Traktis pri la rubrikoj: Propaganda Kroniko, Universala Komunikilo, Bibliografio kaj Notetoj),

La destino de kiu ajn homo ĉiam kuŝas kaj kuŝos en la manoj de Dio...

Ankaŭ sacerdoto Emile Peltier, fortega de koro kaj spirito kristana, sed malforta de sanstato, tiom intense konsciis pri tiu fakto, ke li en marto 1907 en Espero Katolika primeditis sian propran destinon en serena artikolo: „Progresado aŭ morto”.

Li plene malkovris antaŭ ĉies okuloj la plej intimajn pensojn de sia animo, skribante: „Sidante en mia ĝardeno, en salika kajuto, dum tute kontraŭvola ripozo por aerkuracado, mi longe pripensis tiun aferon.²¹⁾

Mi preĝis por ricevi lumon de Dio. Mi demandis min multfoje: ĉu mi haltos sur la vojo, aŭ ĉu mi antaŭen iros? Ĉu por Espero Katolika estos morto aŭ progresado? ĉu mi, kiel komercisto, pesos la materialajn profitojn kaj malprofitojn? Ĉu la direktado de Espero Katolika estas materiala, komerca afero, aŭ apostolado?

Certe mi ĉiam konsideris ĝin kiel apostoladon. La homaj motivoj devas do cedi al la supernaturaj motivoj.

Mi tamen — tion mi konfesas — ankoraŭ ŝanceliĝis.

Mi tiam malfermis la Evangelion kaj legis: „Kiam Mi sendis vin sen sako, sen monujo. sen ŝuoj, ĉu io mankis al vi? Kaj ili respondis: Nenio mankis al ni...” (S. LUKO, XXII, 35.) Kaj sur alia paĝo: „Diris (Jesuo) al Simono: konduku plenmaren kaj disjetu viajn retojn por fiŝkapti.

21) La nesufiĉan nombron de novaj abonintoj.

„Kaj respondante Simono, diris al Li: „Majstro, la tutan nokton laborintaj ni nenion kaptis. Tamen pro parolo cia mi disĵetos la retojn”.

„Kaj farinte tion ili kaptis multnombbron grandegan da fiŝoj...” (S. LUKO, V, 5.)

Fine mi legis: „Se vi havus fidon kiel grajnon de sinapo, vi dirus al tiu monto: transiru de tie ĉi tien, kaj ĝi transirus; kaj nenio estus al vi neebla”. (S. MATEO, XVII, 19)

Sacerdoto Emile Peltier finis sian emociplenan artikolon jene:

„Per la graco de Dio troviĝas en mia koro — ne tiom da fido, kiom necesa por transporti montojn —, sed sufiĉa „fid-ero” por ke mi ne ŝanceliĝu decidi: Espero Katolika ne mortos. Mi ne haltos sur la vojo. Mi ne rezonos kiel komercisto, sed kiel la apostoloj de Jesu-Kristo. Mi forlasos la profesoradon, kaj Dio zorgos pri la necesaĵoj de mia vivo; kaj nenio mankos al mi.

Pro la parolo de Kristo, mi ankaŭ disĵetos mian reton, kaj ĝoje, kaj senlace, kaj prospere!”...

KAPTISTO DE ANIMOJ

Sacerdoto Emile Peltier do sin prezentis al Dio, kiel kaptisto de animoj... per Esperanto!

Pli poste li ankoraŭ konkludos, en aprilo 1907:

„La laboro antaŭ ni estas grandega; sed la divido de l' laboro inter multaj igas ĝin facile farebla, Ĉiu do elektu parton de la tasko, laŭ siaj emoj kaj ecoj. Ne lasu min penadi sola en la redakcio, en la propagando, en la ĉiam plia perfektigo de Espero Katolika. — Ĉiu el vi fosu sulkon, ĵetu semon, kaj baldaŭ la kampo estos kovrata de admirinda rikolto!” Admirinda rikolto...

Baldaŭ montriĝis, ke Dio Mem elektas la rikolton de la kampo. Ĉar la korpa krizo, kiu jam tiom da jaroj turmentis la plej karan rikolton sur la kampo de la katolika esperantista agado, de aprilo 1907 tro rapide, laŭ homa kalkulo, akriĝis. Sacerdoto Peltier kuraĝe, spirite nerompeble, preparis, per artikoloj en Espero Katolika la programon de katolikaj kunvenoj por „la Tria” universala kongreso en Cambridge, Anglujo, sed devis anonci en julio 1907:

„La nuna stato de mia sano ne permesas al mi ĉeesti la Trian Kongreson. La Katolikaj esperantistoj estas petataj turni sin tutkonfide al P-o Richardson²²⁾, sekretario de la katolika Komitato, pri informoj kaj ĉiuj aferoj koncerne la katolikaj kunvenoj”. En la sama numero de Espero Katolika li eĉ ankoraŭ proponis „Projekto de Frataro de Katolik-Esperantistaj Pastroj”²³⁾, kun la celo: „Unuigi la katolikajn pastrojn diversnaciajn por faciligi inter ili per Esperanto rilatojn, pri pastraj sciencoj kaj ĉiuspecaj religiaj aferoj.”

Samtempe li publikigis projekton: „...de Societo: La Abelano Esperantista, Amikano Unuiĝo de katolikaj Komercistoj kaj Industriistoj”, celanta: „Unuigi la katolikajn komercistojn kaj industriistojn el diversaj nacioj en Societo, por faciligi la komercajn internaciajn rilatojn”.

Kaj senripeze — kvazaŭ sentante en sia koro, ke la tempo por li urĝis — li realigis novajn iniciatojn. Kaj anoncis en oktobro 1907:

22) Sacerdoto Richardson, fondinto de la „Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista” (IKUE) en 1910 en Parizo.

23) Poste realigita en la „Sacerdota Rondo” de IKUE.

„Ni fondis ĉe ni Esperantistan Presejon, la Presejo S. Martino, por presi E.K. kaj eldoni katolikan libron. Tia fondo estis jam de longe dezirata de multaj el miaj amikoj, kaj tre necesa por nia agado.” Aldonante al tiu informo: „Ni faris grandan oferon por realigi tiun longe deziratan fondon. Ni esperas, ke niaj amikoj pli kaj pli helpos nin per sia simpatio, per sia efektiva helpo, per multigado de la abonoj, per aĉetoj de la libroj eldonotaj de ni.” Por fini la direktoro de „Espero Katolika” konstatis: „Kvankam la abonantaro ne duobliĝis, kiel ni esperis, tamen ĝi tre ŝatinde pligrandiĝis dum la lasta jaro. Ni enskribis pli ol 100 novajn abonantojn”.

Intertempe la tria universala Esperanto-kongreso en Cambridge (Kembriĝo), Anglujo, jam okazis, kaj en Di-servo je la 11-a de aŭgusto en la „Church of our Lady and the English Martyrs” (preĝejo de Nia Sinjorino kaj de la Anglaj Martiroj), sacerdoto A. Richardson — kiu ankaŭ faris la predikon esperantlingve — voĉlegis telegramon ricevitan el Romo, de Monsinjoro Giambene en kiu tiu anoncis la permeson, doni en la nomo de la Papo la papan Benon, kondiĉe ke la Episkopo de la Kembriĝa diocezo donus plenan permeson; la lasta, tre favora al Esperanto, volonte donis sian konsenton. Laŭ la raporto pri la kunvenoj de la katolikaj esperantistoj, la katolikaj francaj ĵurnaloj „La Croix” (La Kruco), „Le Peuple” (La Popolo) kaj „L'Univers” (L' Universo) publikigis la telegramon pri la papa Beno, pri kiu Emile Peltier en „Espero Katolika” de oktobro 1907, en artikolo pri la kongreso Kembriĝa, raportis:

„Ni bedaŭras, ke ni ne havas la plenan tekston de la Papa Reskripto; sed ni scias, kaj plezure faras rimarki, ke por la unua fojo la vortoj „Tria Kongreso Esperanto” troviĝis en oficiala dokumento Roma. La Sankta Patro benis la Esperantistajn Katolikojn, kunvenintajn ĉe Esperanta kongreso.” En la sama kongreso de 1907 sacerdoto Richardson proponis la fondon „de Societo nomota Societo Katolika Internacia — el kiu kreskis finfine la hodiaŭa Internacia Katolika esperantista Unuiĝo, poste nomita Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.), fondita de sacerdoto Richardson en la Pariza kongreso de katolikaj esperantistoj en 1910.

Ankaŭ de la supre nomita „Societo Katolika Internacia” sacerdoto Richardson fariĝis fonditinto-prezidanto. Laŭ la „Provizora Regularo” la organo de la societo estis „Espero Katolika”, kaj estis la abonmono por la revuo samtempe la kotizo por la societo.

Tiun ĉi fojon internacia societo de la katolikaj esperantistoj fariĝis fakto.

Tio montriĝis ekzemple, pli poste, el komuniko en „Espero Katolika” de novembro 1907, kun jena enhavo: „Estas necese, ke la katolikaj Esperantistoj unuiĝu por la propagando, kaj interkomuniku. Sen tio ili restos malfortaj. Ili unuiĝu per S.K.I. La sola kondiĉo de aniĝo estas abono al E.K.”

Ŝajne intertempe la sanstato de sacerdoto Peltier iom pliboniĝis, kaj tutforte li subtenis la klopodojn, plifirmigi la pozicion kaj organizan bazon de la novfondita societo; tiucele li pliprecizigis en la januara numero 1908 de la revuo: „Ni devas serĉi kiamaniere Esperanto povas utili sur la kampo de agado. Ni pensas, ke la Societo Katolika Internacia liveras al ni tiun rimedon.” Donante praktikan sugeston li proponis: ”Kial ne krei specialistajn sekciojn en ĝi?”. Kaj li proponis la tujan fondon de „sekcio por socialaj enketoj.”

Fine de septembro 1907 pilgriminte al Lourdes, kaj reveninte — kiel li opiniis korpe pli forta kaj sana — la direktoro de „Espero Katolika” en la revuo de marto 1908 publikigis: „...mi promesis al la Sankta Virgulino, kiel atesto de dankeco pro mia resaniĝo, la publikigon de kelkaj miraklaj faktoj okazintaj en Lourdes.” Li anoncis la verkadon de libreto pri la mirakloj de Lourdes, kiu devus aperi fine de februaro 1908.

Sed informo en la aprila numero sciigis: „Pro diversaj kaŭzoj (instalo de nova presmaŝina, malsano de l’ Direktoro) tiu numero aperas iom pli malfrue. Same estis malfruigitaj Lando de mirakloj kaj la Jarlibro. Niaj legantoj bonvolu pardoni tiujn malfruojn: homo proponas, Dio disponas”.

„HOMO PROPONAS, DIO DISPONAS”

Sacerdoto Emile Peltier mem skribis tiujn vortojn en aprilo 1908. Kvankam li ne sciis tion; Dio tamen jam dekalkulis la tagojn de la esperantista apostolo.

Des pli da konturo post tiom da jaroj akiras jenaj vortoj, kiujn la direktoro de „Espero Katolika” skribis en majo 1908: „Mi devas konfesi, ke ĝis nun laikoj helpis min pli ol pastroj. Mi tamen plej sincere dankas la kelkajn kunfratojn, kiuj alportis al E.K. sian sindonemecon kaj laboron. Sed laŭ alia parolo de l' Sankta Skribo: Messis quidem multa, operarii autem pauci”²⁴⁾

Mi estas mortebla homo. Kio fariĝus pri E.K. post mi, se nenia pastro kutimis kunlabori al la gazeto? Miaj fortoj havas limon...”

En junio 1908 li publikigis jenan komunikon en „Espero Katolika”:
„Por la dua fojo mi pilgrimos al Lourdes, por plenfide peti la miraklon de mia resaniĝo. Mi foriros el Tours la 13-an de Julio, kun la Turena pilgrimo, inter la multaj malsanuloj, kiujn oni devos porti aŭ veturi de l' hospitalo al la sankta groto. Mi estos en Lourdes de la 14-a de Julio ĝis la 17-a. El mia tuta koro mi petas la plej fervorajn preĝojn de la legantoj de E.K. por la resaniĝo de ĝia Direktoro. Tiam mi povos pli-meti ĉapitron al Lando de Mirakloj, por la plej granda gloro de Dio kaj de Nia Sinjorino”.

„Espero Katolika” de julio 1908 anoncis:

„La lando de mirakloj” fine aperis, kaj estas aĉetebla por 0 fr. 50 afrankite”. Kaj sacerdoto Emile Peltier komunikis en la sama numero, pri sia vojaĝo al Lourdes:

„Ni ĉeestis tiujn festojn, sed bedaŭrinde ni ne povis plene ĝui ilin, pro malhelpanta sanstato. Ni revenis el Lourdes ne resanigita: la Dia Providenco elektas mem la tagon kaj la horon por sia bonfaremo, kaj ni devas submetiĝi al Lia senerara saĝeco ... Tamen nia sano estas iom pli bona, kaj mi konservas la esperon, ke dum alia pilgrimo, aŭ eĉ sen pilgrimo, la Sankta Dipatrino nin plene resanigos. Danku ŝin niaj amikoj pro la komencita pliboniĝo, kaj ili daŭrigu preĝi por la Direktoro de E.K.”

24) „Rikolto ja estas multa, laboristoj tamen malmultaj.”

Nek en aŭgusto nek en septembro 1908 „Espero Katolika” aperis, kiel anoncite en la julia numero. Ke ĝi ne aperis en la sekvantaj monatoj de 1908, ne estis antaŭvidite.

La apero subite komplete haltis pro konsiderinda pligraviĝo de la malsano de la direktoro de „Espero Katolika”.

„Espero Katolika” denove aperis en la komenco de 1909, kiel duobla numero „No. 51. Januar-Februaro”, kun „Antaŭparolo por la 6-a Jaro 1909” de Emile Peltier, kiu skribis:

„Karaj legantoj!

Skribante tiun artikolon, mi malobeas la ordonojn de mia kuracisto pri plena ripozo. Tial mi faros ĝin tre mallonga.

Kiel papilio, post ŝajna morto, eliras pli brilanta el sia malliberejo, tiel Espero Katolika post ŝajna trimonata morto — eliras, el la gravega krizo, pli viva, pli forta, tute reorganizita. Komitato direktanta kaj tre lerta ĉefredaktoro, al kiu vi povas plene konfidi, prenis sur sin la tutan laboron.

Mi estas certa, ke neniu el niaj karaj abonantoj forlasos la revuon, en momento kiam ĝi bezonas plej energian helpon. Ĉiuj restos fidelaj al Espero Katolika.” Al tiu ĉi alvoko sacerdote Peltier sekvigis ankoraŭ kelkajn konsilojn pri aktiva propagando, proponante la formadon de „komitatoj da 2-4 personoj, precipe virinoj kaj membroj de K.S.L.”, kiuj estus „samtempe Informagentoj por katolikoj”. Li finis sian artikolon jene:

„Memoru, ke propagando estas vana, se ni ne estos utilaj. Mi esperas, karaj legantoj, ke tiu-ĉi alvoko estos aŭdita”. Subsigno estis simple: „Em. Peltier”

Parolante pri „Komitato direktanta” sacerdote Peltier celis al aktiva „ekipo”, kiu sub la direkto de sacerdote Austin Richardson, la prezidanto de la „Societo Katolika Internacia” transportis la administracion kaj redakcion de „Espero Katolika” al Parizo - pro la kritika sanstato de sacerdote Peltier — kaj daŭrigis la prizorgon de la revuo ĝis 1914, ĝis la unua mondmilito ekkreis. La nova redakcia komitato de 1909 elektis kiel ĉefredaktoron Claudius Colas, kiu en la dua mondmilito perdis la vivon sur la batalkampoj, kaj kiel ĉefa kunlaboranto eklaboris la ŝatata kaj fama sacerdote-poeto monsinjoro Dombrovski.

La komitato publikigis en la januar-februara numero 1909 multpaĝan „Deklaracio” pri siaj planoj, enkondukante tiun deklaron per esprimo de profunda kaj sincera malĝojo „de la Esperantistaro, pri la foresto de nia kara amiko kaj majstro²⁵⁾, al kiu kruela malsano malpermesas pli longan laboron.” La artikolo emfazis, ke sacerdoto Peltier „havis la meriton esti el la unuaj, kiuj komprenis la gravecon de Esperanto por la bono de la homaro kaj de la religio. Li batalis por ĝia triumfo, kun forta energio kaj firma fido, ĝis la momento, kiam liaj fortoj, elĉerpitaj per peza kaj obstina laborado, mankis al lia kuraĝo: la mondo katolika komprenos, en la estonto, lian grandan meriton, kaj lin konsideros kiel apostolon.”

Jes, „liaj fortoj, elĉerpitaj....”

La fortoj de la esperantista apostolo Emile Peltier envere estis eluzitaj....

De Pau, kie li esperis profiti de la pli milda klimato, sacerdoto Emile Peltier denove — estis por la lasta fojo — faris pilgrimon al Lourdes, demandante al la Dipatrino, kiel tion priskribis Fraŭlino Le Boedec tiel trafe en „Franca Katolika Esperantisto” de aprilo 1959, „aŭ resanigi lin aŭ doni al li la gracon, morti ĉe ŝia Sanktejo....”

Estis tiu lasta graco, kiu estis donita al li: sacerdoto Emile Peltier mortis en Lourdes, la 16-an de februaro 1909....



„Espero Katolika” de marto 1909 en nigra kadro anoncis la morton de sia fondinto, aldonante jenajn vortojn de memorigo: „Espero Katolika funebras. Ĝia fondinto, nia tre kara amiko Abato Peltier mortis.

Tiu morto, superflue estas diri, naskas en ni profundan doloron. Abato Peltier estis vera apostolo; lia vivo estis admirinda ekzemplo de laborado senĉesa, de konstanta sindonado. Unu el la unuaj li komprenis la utilecon de Esperanto por la sankta Eklezio: li projektis unuigi ĉiujn kristanojn en unu ŝafaro, sub la konduko de tiu, kiu estas laŭ nia katolika kredo, la unika Paŝtisto. El tiu bela penso naskiĝis Espero Katolika.

25) Sacerdoto Emile Peltier.

Li laboradis kun sia tuta animo por la efektivigo de sia revo, ĝis la plena elĉerpo de niaj fortoj. Li mortis, post longa suferado korpa kaj morala, viktimo de sia laboro.”

Nome de la redakcia komitato kaj legantaro de „Espero Katolika”, nome de la Majstro²⁶⁾, kiu skribis al ni por tio, kaj de la tuta esperantistaro, kiu profunde lin estimadis, ni kun emocio prezentas al lia malfeliĉa patrino la esprimon de nia sincera, profunda kondolenco. Povu nia dolorplena partopreno plidolĉigi ŝian ĉagrenon!”

Kaj Claudius Colas, la ĉefredaktoro de „Espero Katolika” ankoraŭ aldonis:

„El tia vivo post tia morto ni devas tiri tri konkludojn.

La revo de Abato Peltier ne estas ankoraŭ efektivigita. Li montris al ni — plivere li malfermis al ni — la vojon en kiun „rekte, kuraĝe kaj neflankiĝante” ni devas iradi.

Lia verko, devas postvivadi.

Espero Katolika, lia kara revuo, estis, ĝis tiu lasta momento, lia plej kara, plej konstanta priokupado.

Li ĝin enmetis en niajn manojn, kiel patrino mortonta komisias en manojn amikajn sian amatan infanon.

El la ĉielo, kie, ni ne dubas, lia bela animo purigita de longa suferado ripozas apud Dio, li preĝos por ni.

Pace ripozu, sankta amiko! Vian ekzemplon sekvante, ni daŭrigos ĝis plena triumfo, la noblan laboron, kiun por Dio kaj por la Homaro vi kuraĝe entreprenis.”

Jen kiel la katolika esperantistaro adiaŭis sian grandan pioniron.

„Ĝis la lasta horo li konservis sian konscion, sian tutan submetiĝon al la volo de Dio”, — komunikis Josée Guivy en artikolo en la marta numero de 1909 — kaj ripetis: „Mia Dio, mi prezentas al vi mian vivon por Franclando, por mia revuo „Espero Katolika”, por tiuj, kiuj preĝis aŭ preĝos por nia animo.”

En la tero de la tombejo en Lourdes ripozas de post februaro 1909 la korpo de sacerdoto Emile Peltier, ne nur la fondinto de „Espero Katolika”, sed, kiel prave rimarkigis Fraŭlino Huguette Royer en la numero de oktobro 1953 — okaze de la ora jubileo de la internacia

26) D-ro Zamenhof.

katolika revuo: „ankaŭ la inidatinto de la Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, kiu estas fondita unu jaron post lia morto dank' al la rezultatoj de li akiritaj.”

Modesta tombŝtono, starigita de la katolikaj esperantistoj, memorigas simple, ke en Lourdes estas enterigita la fondinto de „Espero Katolika”.

En julio 1959, je lundo de Pentekosto, la esperantista grupo katolika el Tours, memore al la kvindeka datreveno de lia morto, solene malkovris marmorŝtonon en la domo en Villandry, en kiu sacerdoto Emile Peltier naskiĝis 20.9.1870; kaj pilgrimis poste al Sainte-Radegonde, por viziti la domon, en kiu vivis kaj laboradis la fondinto kaj unua ĉefredaktoro de „Espero Katolika.”

Nun, sesdek jarojn post lia morto, la internacia katolika esperantistaro respektplene kaj danke dediĉas tiun ĉi biografion kiel omaĝon sinceran al la kara rememoro de la plej granda figuro el sia historio.

KOLOPONO

„Emile Peltier”
estas originala biografio
pri la franca sacerdoto
Emile Peltier
fondinto de „Espero Katolika”
oficiala organo de la
Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.
La biografio estas verkita de la
nederlandano Nicolaas Hoen
kaj aperis kiel unua numero en la serio
„Kristana Kulturo”
eldonita okaze de la 60-jara ekzistado de
„ESPERO KATOLIKA”

Ĝi estas presita en Tilburg Nederlando
de la Presejo Piet Smits
en kvanto de 1000 ekzempleroj

APRILLO 1963

